# LA LIBERPENSULO

Por Racio... ★ Per Esperanto...

## Bulteno de Liberpensula Frakcio de S.A.T.

Nº 1 — Redakcio : GAY André, rue Lambert-Dumesnil HERBLAY (S.-et-O.) Francio - C. C. P. Paris 10549-49 — Jaro 1954

## NASKIĜO !

Nia Frakcio estas dujara ! Ĝi naskiĝis post mia alvoko en Sennaciulo de decembro 1952, kaj de nun estas bona kerno da frakcianoj en sekvantaj landoj : Francio, Germanio, Sarlando kaj Svisio. En Britio kaj en Nederlando, la kelkaj frakcianoj... dormetas.

Nia tasko estas grandega, ĉar ni celas emigi al la kamaradoj nenion kredi sed ĉion pripensi. Ni deziras kontraŭbatali la dogmojn, *ĉiujn dogmojn*.

La devo de ĉiu konscia ateisto, raciisto, anogstikisto, k.s., estas nin helpi en tia gravega tasko.

Hodiaŭ aperas la unua numero de nia Bulteno, dank'al la monhelpo de kelkaj kamaradoj. Ni ilin dankas.

Ĉu ĝi aperos ofte, regule ? Tio dependos de la sukceso de tiu-ĉi unua naskito. Vi povas nin helpi aĉetante multkvante nian bultenon, ĝin disdonante kaj ĝin diskonigante.

Ni pretas fari nian tutan taskon, faru la vian !

Gajulo.

## RELIGIOJ KAJ STATISTIKO
## " UNIVERSALA DIO REVELACIUS UNIVERSALAN VERON "

Tion skribis, en sia fama testamento, pri kiu jam atentigis Voltero, parohestro Meslier (Melje'), mortinta 1753.

Lian tekston oni ankoraŭ nun povas utile legi :

« Tiel malsame sin konigis Dio en la diversaj landoj de nia tergiobo, ke pri religio la homoj sin reciproke rigardas kun malamaj kaj malŝataj okuloj. La anoj de la diferencaj sektoj sin opinias reciproke tre ridindaj kaj tre malsaĝaj. La misteroj plej respektataj en iu religio estas mokindajoj en alia. Car Dio penis sin malkaŝi al la homoj, almenaŭ li devus paroli al ĉiuj la saman lingvon ; kaj maltrudi al ilia mallerta menso tiun embarason : serĉi, kiu povas esti la religio vere elveninta de li, kiu estas la kulto vere agrabla al liaj okuloj.

« Universala Dio devus revelacii universalan religion. Pro kiu fatalo troviĝas do tiom da malsamaj religioj sur la tero ? Kiu estas la vera inter la multo de tiuj kiuj pretendas esti tia, ĉiu ekskluzivante ĉiujn aliajn ? Ja konvenas kredi, ke neniu ĝuas tian superecon ; divido kaj disputo inter la opinioj estas la nedubindaj signoj pri necerteco kaj malklereco de la principoj el kiuj oni deduktas. (§ 114) »

« Por saĝa homo, nenio aperas pli ridinda ol la opinio formata, unu pri